

Patro Nia, Ŝtato, kiu estas en la ĉielo

Vicent Boix

Venu Via regno

Li estis forpelata el la hispana ŝtato. Li estis monpunata per 3.240 eŭroj. La “krimo” de tiu ĉi senegalano: vendi 45 DVD-ojn kaj 147 muzik-KD-ojn. Ĉiujn falsigitajn. Sentenco el Granada tribunalo. Je la pasinta januaro. Li ne iris en prizanon. Sed ĉar li ne havis loĝpermesonⁱ.

Dume la asekurejo AIG ruiniĝis. En Usono. Ĝiaj stabanoj disipadis milojn da dolaroj. Por luksaĵoj kaj plezuraĵoj. Stabanoj de Freddie Mac. Alia fiaskita entrepreno. Ili subaĉetis respublikanajn konsilistojn. Ili volis bremsi leĝproponon. Iu trudanta kontrolon al iliaj “negocoj”ⁱⁱ. Li havis neniun loĝpermeson. La senegalano. La kravatuzantuloj havis. La justeco estas mur-fermigita.

Kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn

La savprojekto de iuj landoj el la EU superpasas la 2,39 bilionojn (10^{12}) da dolaroj (1,9 bilionojn da eŭroj). Per tiu ĉi mono, se nepras, la ŝtatoj povos aĉeti bankakciojn, garantii la pruntodonojn inter kompanioj kaj akiri aktivojnⁱⁱⁱ. Ĉe la aliaj marbordo la savprojekto, kiun proponis George Bush, atingos la kvanton de 700.000 milionoj da dolaroj. Tamen la usona registaro jam investis 765.000 milionojn da dolaroj disdonitaj tiel: 150.000 en impoŝtedono por stimuli la konsumadon, 300.000 en malmolaj hipotekaj kreditoj, 200.000 en la fiasko de la hipotekagentejoj Fannie Mae kaj Freddie Mac, kaj 115.000 en la ŝtatigo de iuj entreprenoj kiel la asekura agentejo AIG, kiujn supoze oni reakiros per la vendo de ties aktivoj^{iv}.

Mono uzata ĉe Usono por alfronti la krizon: 765.000 milionoj da dolaroj. Pu-

blika mono por estontaj savoj ĉe Usono: 700.000 milionoj da dolaroj. Publika mono por estontaj savoj ĉe la EU: 2,39 bilionoj da dolaroj. Entute 3,85 bilionoj da dolaroj.

kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj

La entuta kvanto de tio, kio povus esti la plej granda ŝtelo de la tuta historio, samvaloras kiel la sumo de la Malneta Enlanda Produkto de Hindio kaj Turkio je la 2007a. Ĝi duobligas tiun de Brazilo kaj tiun de Afriko, triobligas tiun de Meksikio, Hispanio aŭ Italio, sepobligas tiun de Argentino, dekobligas tiun de Urugvajo^v.

La ekstera ŝuldo de la sudaj landoj (misnomataj subdisvolvitaĵoj) estis de 2,5 bilionoj da dolaroj komenence de la jarmilo^{vi}. Se la kapitalo, pretigita por savi bankojn, celus savi landojn, ankoraŭ restus 1,35 bilionoj. Je la junio de la 2005a la G8 anoncis malpliigon per 55.000 milionoj da dolaroj^{vii} de la ŝuldo por ĉirkaŭ 40 landoj grave enŝuldigitaj. Eta pomada flaskono kompare al la multekostaj kaj implikegaj ĥirurgiaj operacioj, kiujn oni praktikis al la financa sistemo.

1.400 milionoj da personoj vivas je ekstrema malriĉeco^{viii} kaj, laŭ la Organizaĵo pri Nutrado kaj Agrikulturo, 923 milionoj suferas malsaton ĉe la mondo (75 pli ol dum la pasinta jaro)^{ix}. Por elradiki la malsaton la direktoro de ONA agnoskis la bezonon pri 30.000 milionoj da dolaroj ĉiujare. Ĝi nur atingis kolekti 7.500 milionojn por kvar jaroj, tiel riskas fiaski iu el la celoj de la jarmilo. Aĉeti nutraĵojn ĝis la 2015a (ĉe la koncernaj landoj mem kaj ne la usonajn kro-

maĵojn) kostus 240.000 milionoj da dolaroj (300.000 x 8 jaroj)^x. Daŭre restus 1,11 bilionoj.

La Oficiala Helpo al la Disvolvado de la Bush-a registaro atingis 27.500 milionojn da dolaroj je la 2005a^{xi}. Iu 2% el tio, kion ĝi elspezis por siaj savprojektoj. Ĉiuj la riĉaj landoj oferis entute ĉirkaŭ 100.000 milionojn da dolaroj je la 2007a, sed laŭ UN mankus 18.000 pliajn milionojn^{xii}. Oni povus aboni tiun ĉi aldonon dum la proksimaj 10 jaroj (180.000 milionoj) sen altrudi ŝanĝojn ĉe la enaj politikoj kaj ankoraŭ restus disponeblaj 930.000 milionoj.

Iu el la celoj de la jarmilo estas, ke ĉiuj lernantoj de la mondo debas fini la unuagradan instruadon je la 2015a. Ĉu fantaziaĵo? Laŭ la Hispana Alianco Kontraŭ la Malriĉeco tiun celon oni ne atingos je la celata dato. 75 milionoj da infanoj ne vizitas lernejon, kaŭze de tio, ke iliaj ŝtatoj elspezas pli da mono je la ekstera ŝuldo ol je instruado. Laŭ tiu Alianco la landoj kun malaltaj enspezoj ricevis je la 2006a 5.000 milionojn da dolaroj kiel rektan helpon por la instruado. Tamen oni bezonas pliajn 6.000 milionojn por plenumi la celon^{xiii}. Se oni garantius ilin ĝis la 2015a, oni bezonus 48.000 milionojn da dolaroj (6.000 x 8 jaroj). Restus 882.000 milionoj.

2.400 milionoj da personoj ne havas aliron al deca necesejaro kaj al pli ol 1.000 milionoj mankas trinkebla akvo. 2 milionoj da infanoj mortas ĉiujare kaŭze de malsanoj, kiuj disvastiĝas per malpura akvo aŭ netaŭgaj necesejinstalaĵoj^{xiv}. La UN kalkulis je la 2001a, ke oni bezonus 23.000 milionojn da dolaroj ĉiujare por havigi trinkeblan akvon kaj necesejaron al ĉiuj loĝantoj de la planedo, plenumante tiel alian celon de la jarmilo je la 2015a. Unu fojon plu oni ne atingis la kalkulon, ĉar oni provizis nur per 16.000 milionoj. Asigni la 7.000 mankantajn ĉiujarajn milionojn signifus entute 98.000 milionojn da dolaroj (7.000 x 14). Ankoraŭ restus 784.000 milionoj da

dolaroj^{xv}.

Tutmonde je la jaro 2006a mortis 72 infanoj kun aĝo sub 5 jaroj el ĉiu 1.000 vivantaj naskiĝintoj kaj la patrino morteco inter la jaroj 1990a kaj 2005a malpliigis apenaŭ 1%. Kun tiuj ĉi ciferoj oni estas tre for ol la plenumo de iu celo de la jarmilo. Je la sama jaro laŭ UN estis alportata la avara kvanto de 3.500 milionoj da dolaroj por plibonigi la patrinan, novnaskiĝintan kaj infanan sanon. Estus bezonataj pliaj 7.000 milionoj ĉiujare, tio estas 56.000 milionoj da dolaroj por la proksimaj 8 jaroj. Ĉe la monujo ankoraŭ sonorus 728.0000 milionoj^{xvi}.

Dekoj da milionoj da personoj mortas ĉiujare pro aidoso, ftizo, marĉofebro kaj aliaj malsanoj. Je la 2006a oni kalkulis, ke la cifero por atingi la celon de la jarmilo pri la malpliigo de la morteco pro tiuj kaj aliaj patologioj estus 20.000 milionoj da dolaroj. Malnepras diri, ke oni ne taŭgis kolekti tiun ĉi sumon. Se oni prenis tion kiel referencon kaj tio estus pagita ĝis la jaro 2015a, oni bezonus 200.000 milionojn da dolaroj (20.000 x 10 jaroj)^{xvii}. Restus ankoraŭ 528.000 milionoj por daŭrigi la ŝanĝon de la mondo.

Laŭ *Save The Children* 10 milionoj da gejunuloj mortas ĉiujare pro pneŭmonio, morbilo kaj tetanoso. La kuraciloj de tiuj ĉi malsanoj kostus po unu persono 30, 15 kaj 40 eŭrocentojn respektive^{xviii}. Apliki ĉiujn kuracilojn supozus entutan kvanton el 10 milionoj da dolaroj. Unu dolaron po infano. Groŝaĉo. Hontinde.

Ĝenerale por antaŭenirigi la jarmilcelojn estus bezonataj 150.000 milionoj da dolaroj ĝis la 2010a. Je septembro de la 2008a ĉe kunveno de UN en Novjorko la disvolviĝintaj landoj taŭgis alporti nur 16.000 milionojn^{xix}. Fiŝercaĵo kompare al la egaj kvantoj alportataj por ŝmiri la tutmondan bankan sistemon.

Ĉe la Pint-kunveno de la Jarmilo de la 2000a estis starigita celserio plenumenda je la 2015a. Oni nomis ilin celoj de la

jarmilo kaj la plejmulton el ili oni citis per tiuj ĉi artikolo.

Eble ili estus atingeblaj kaj eĉ oni povus celi multajn pliajn aferojn, se oni uzus pli altruisme la publikan monon disponebla por savi koruptajn bankojn. Probable daŭre restus monon, kiun oni povus dediĉi al aliaj celoj. Ekzemple por duonigi la analfabetecon, kiu laŭ Unesko tuŝis 700 milionojn da homoj je la 2005a. Tiu celo estis fiksata ĉe la Dakara Forumo kaj postulus 26.000 milionojn da dolaroj^{xx}.

Kaj ne konduku nin en tenton

La 27an de oktobro *rebellion.org* publikigis ampleksan artikolon de Éric Toussaint^{xxi} pri la kialoj de nutraĵa krizo. La verkinto rakontis, kiel la belga banko KBC komencis reklaman kampanjon por instigi la civitanaron investi je ses bazaj

nutraĵoj. Ĝiaj reklamoj proklamis senpudore: “Eltiru profiton el la pliiĝo de la prezoj pri nutraĵaj produktoj”. Laŭ Toussaint la reklamado prezentis kiel “ŝancon” la “malabundon el akvo kaj laboreblaj kamparaj terenoj”, kiu okazigas “malabundoj kaj sekve prezopliigon de la bazaj nutraĵaj produktoj”^{xxii}.

Hazarde kaj paradokse je la sama tago la komunikiloj informis, ke la belgia registaro decidis injekti 3.500 milionojn da eŭroj al la KBC^{xxiii}. Ĉu servus la publika kapitalo por stimuli kaj akriĝi la malsaton pere de la krimea spekulacio de la ĝentil-manieraj teroristoj? Kaj grava dubo angorigas min post verki tiun ĉi artikolon: ĉu povos pagi la manĝaĵon la senegalano forpelita pro tio, ke li vendis neleĝajn DVD-ojn?

BOIX, Vicent: «Papá estado que estás en los cielos», 2008.
<http://www.elparquedelashamacas.org>. Esperantigis Jurgo Alkasaro



Vi rajtas:

- **dividi** – kopii, distribui kaj transdoni la verkon
- **remiksi** -- adapti la verkon

Laŭ jenaj kondiĉoj:

- **Atribuo.** Vi devas atribui la verkon tiel kiel specifis la aŭtoro aŭ la permesil-posedanto (sed ne en maniero kiu implicas ke ili subtenas vin aŭ vian verkon).
- **Nekomerca.** Vi ne rajtas uzi tiun ĉi verkon por komercaj celoj.
- **Distribui kun sama permesilo.** Se vi ŝanĝas, adaptas, aŭ faras ion, kio baziĝas sur tiu ĉi verko, vi rajtas distribui la rezultan verkon nur kun permesilo identa aŭ simila al tiu ĉi.
- Por iu ajn reuzo aŭ distribuo, vi devas klarigi al aliaj la permesilon de tiu ĉi verko.
- Ajna el tiuj ĉi kondiĉoj povas esti nuligita se vi ekhavas permeson de la kopirajto-posedanto.
- Nenio en tiu ĉi permesilo endanĝerigu aŭ limigu la moralajn rajtojn de la aŭtoro.

- i <http://www.lavozdigital.es/cadiz/20080108/andalucia/expulsan-durante-diez-anos-20080108.html>
- ii <http://www.lavanguardia.es/lv24h/20081008/53556319650.html> kaj <http://www.univision.com/contentroot/wirefeeds/usa/7629931.html;jsessionid=UDBUR5BK5BJQ4CWIABTCFEYKZAAGAIWC>
- iii <http://www.expansion.com/2008/10/13/inversion/1223912685.html>
- iv <http://www.invertia.com/canales2/canal.asp?idcanal=755>
- v [http://es.wikipedia.org/wiki/Anexo:Pa%C3%ADses_por_PIB_\(PPA\)](http://es.wikipedia.org/wiki/Anexo:Pa%C3%ADses_por_PIB_(PPA))
- vi <http://www.intermonoxfam.org/cms/HTML/espanol/395/mso2B1.pdf>
- vii http://news.bbc.co.uk/hi/spanish/business/newsid_4083000/4083122.stm
- viii http://www.rebelatecontralapobreza.org/IMG/pdf/REVISION_ODM_2008_2_.pdf
- ix “Punto de Fuga”, Cadena Ser, 18a de oktobro de 2008, en http://www.cadenaser.com/actualidad/audios/punto-fuga-18-10-2008/csrsrpor/20081020csrsr_18/Aes/
- x <http://www.fao.org/newsroom/es/news/2008/1000853/index.html> kaj <http://www.rebellion.org/noticias/economia/2008/10/lo-gastado-en-planes-de-rescate-hubiera-servido-para-acabar-con-el-hambre-por-50-74149>
- xi <http://usinfo.state.gov/esp/Archive/2006/May/15-73625.html>
- xii <http://pda.adn.es/mundo/20080404/NWS-1032-Desarrollo-Oficial-Espana-Ayuda-aumento.html>
- xiii http://www.rebelatecontralapobreza.org/IMG/pdf/REVISION_ODM_2008_2_.pdf
- xiv <http://www.odmamericalatina.org/frontEnd/main.php?idSeccion=6736>
- xv http://www.un.org/spanish/conferences/wssd/agua_ni.htm
- xvi http://www.rebelatecontralapobreza.org/IMG/pdf/REVISION_ODM_2008_2_.pdf kaj http://www.cinu.org.mx/prensa/especiales/2008/ODMs_informe2008/Fact%20Sheets%20PDF%20-%20Definitivas/Fact%20Sheet%204.pdf
- xvii <http://www.odmamericalatina.org/frontEnd/main.php?idSeccion=6735>
- xviii “Punto de Fuga”, Cadena Ser, 11a de oktobro de 2008, en http://www.cadenaser.com/actualidad/audios/punto-fuga-11-x-2008/csrsrpor/20081013csrsr_10/Aes/
- xix <http://www.rebelatecontralapobreza.org/spip.php?article391>
- xx http://portal.unesco.org/es/ev.php-URL_ID=30708&URL_DO=DO_TOPIC&URL_SECTION=201.html
- xxi Prezidanto de la CADTM-Belgio (Komitato por la Nuligo de la Triamonda Ŝuldo)
- xxii <http://www.rebellion.org/noticia.php?id=74917>
- xxiii http://www.negocios.com/negocios/27-10-2008+belgica_inyecta_3_500_millones_euros_banco_kbc,noticia_1img.31.31.36063